

SUDFRANCIA★STELO

N° 165 - 2a kvaronjaro 2003 - 1° trimestre 2003 - 1 € 50

- ☆ Dulingva bulteno eldonita de la Esperanto-federacio de Langvedoko-Rusiljono ☆
☆ *Bulletin bilingue édité par la fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon* ☆
☆ *Jarabono/Abonnement : 6 € al pck/ au CCP 956-28 P Montpellier (Fédé d'E)* ☆

Coup sur coup, deux grands journaux viennent de parler de l'espéranto . En France, "Le Monde" a publié une page complète le 14 juin (page achetée par un espérantiste et mécène japonais) . Le texte reconstitué peut être lu p.8 et 9 . En Grande-Bretagne, "The Guardian" du 12 juillet a fait paraître un long texte sur la langue internationale (le texte en anglais peut être reçu sur envoi d'une enveloppe affranchie pour 50 grammes) .

Les grands congrès d'été ont débuté . Après SAT à La Chaux de Fonds, dans le Jura suisse, UEA attend quelque 1700 congressistes à Göteborg^{*} en Suède . Délégations les plus nombreuses : la France et le Japon avec 200 personnes, suivis de l'Allemagne et de la Suède . Nous espérons pouvoir lire dans le prochain SFS les impressions de nos ami(e)s parti(e)s là-bas . Vous pouvez suivre le congrès de chez vous en consultant le site www.uk-2003.net, qui donnera des détails sur le programme à partir du 26 juillet .

(* Göteborg = Götenburg)

Pékin accueillera bien l'an prochain le 89^o congrès mondial, malgré les bruits qui ont couru . Dès le congrès de Göteborg, il sera possible d'adhérer et d'avoir des renseignements généraux . Vilnius se prépare aussi pour 2005 . Sur internet, il est possible de se promener dans la capitale de la Lituanie... en espéranto www.turizmas.vilnius.lt

En Languedoc-Roussillon se déroulera le mois prochain la 29^o semaine internationale de Sète . En septembre (voir p.5) une semaine touristique en compagnie d'espérantistes belges (flamands) . D'autres possibilités existent à cette époque à l'étranger (voir p.12) .

Mais Septembre vous invite aussi aux foires des associations avec stand espéranto à Béziers le 13, Montpellier le 14 et Agde le 20 ainsi qu'à notre réunion d'automne à Béziers le 27 .

Gis baldaù en Esperantio kaj bonan legadon de tiu-ĉi numero !

Kaj kompreneble belan veteron por viaj ferioj !



Dans ce numéro :

- pages 2 et 3 : compte-rendu du congrès fédéral de Lodève; appel à infos
- page 4 : nouvelles de Béziers et du stage de Vias
- page 5 : nouvelles de Montpellier et Prades . Semaine de tourisme en Lozère
- page 6 : comptes rendus de "Midi Libre" sur la visite de Georges Kersaudy
- page 7 : presse espérantiste sur le congrès de Cap d'Agde
- pages 8 et 9 : texte de "Le Monde" sur l'espéranto
- pages 10 et 11 : la presse sur le problème des langues
- page 12 : infos diverses
- page 13 : exposition - CD-Rom - "Mi amas vin"
- page 14 : mots croisés, humour .

Bonne lecture ! Bonan legadon !

FEDERACIA KONGRESO EN LODÈVE (24 V) :

Malgraù la timoj (majaj longaj semajnfimoj, samdataj manifestacioj, strikoj) partoprenis kontentiga nombro da gesamideanoj (22) sed , krom unu el Lozère, ĉiuj aliaj estis el Hérault . Kie do estas Gard-, P-O- kaj Aude-anoj ? Tute taûga kaj bone ekipata salono en la urbocentro, senpage disponigita de la municipo, tamen ni devis subskribi asekuron . Ni ĝojis konatiĝi kun kelkaj novaj esperantistoj, inter kiuj du el Lodève mem kaj apude . Amika etoso, pozitivaj diskutoj, unuanimaj decidoj (krom unu) . La raporto, kiu sekvas, estas laùmemore redaktita, pro neĉeesto de la sekretario, do certe enestas forgesoj kaj eraroj (bonvolu sciigi) . *En kursivoj estas postikongresaj rimarkoj kaj novajoj.* Post bonvenigaj vortoj de la prezidanto Jean Hénin (JH) kaj senkulpigo de pluraj federacionoj, unue oni decidis pri la tagmango, pro atendita resaldo de la restoraciestro (nefacila tasko kun francaj esperantistoj !) . JH klarigis, kial oni finfine kongresis en Lodève kaj mencias la renkontitajn malfacilaĵojn . *Kiu pretas invitri por 2004 aù prizorgi la aranĝon ie, inter aù apud Béziers/Montpellier ?*

La financa raporto reliefigis bonan staton de la financoj, dank'al la atenta prizorgado de nia dankinda kasistino, Lucette Négron . Malgranda deficiteto por SFS, ĉar ni ankaù interŝanĝas nian bultenon kun aliaj federacioj kaj sendas ĝin senpage al kelkaj novuloj . Ĉiujare ni devas realvoki al neglektemaj personoj . Ĉu sisteme forstreki la nomojn de tiuj, kiuj ne pagas akurate ? *Ĉu vi-mem pagis vian reabonon por 2003 aù atendas dufojan realvokon ?* Dankojn al André Capus pro tiu tasko, ankaù pro la presado kaj ekspedo . En 2003 estas antaŭvideblaj elspezoj pro la vizito de G. Kersaudy, pro la eldono de broŝuro por la Sat-Amikara kongreso en Cap d'Agde, pro la realigo de novaj banderoloj kaj presado de flugfolioj . Estas esperata subvencio de la regiono por la kongreso de Cap d'Agde, kvankam mispaño povas faskigi la aferon . JH precizigis, ke tia subvencio estas de la regiona konsilantaro kaj ne el la poño de ties prezidanto . LN ankaù mencias, ke en niaj ĉiujaraj enspezoj estas repago fare de UFE de parto de la nacia kotizo (vidi ĉi-poste pri nova kontrakto kun UFE).

Por la **moralaj raportoj** JH ne detaligis la faritaĵojn de la jaro, ĉar raporto ĝis januaro aperis en "Le Monde de l'E°" kaj SFS raportas ĉiutrimestre . Menciindas monataj kunvenoj, kursoj, prelegoj, staĝoj (Vias, Sète), amikaj renkontoj, forumoj de asocioj, anoncoj en gazetoj (pagaj kaj nepagaj), Z-tago (Béziers) , partopreno en internaciaj kongresoj, kampanjo al deputitoj (kun la bedauro, ke ne pli da federacioj partoprenis), kunpreparado de landa kongreso (Cap d'Agde), eldono de novaj broŝuroj, vizitoj de eksterlandanoj, federacia bulteno (dankojn al la raportintoj; atenti la limdatojn !) kaj federacia renkonto, gazetartikoloj kaj rebatoj . La federacio ne "ronronis", kiel iu akuzis lastjare . Dankojn al tiuj, kiuj kontribuis . Pli kaj pli bone eblas, tio estas ĉies afero kaj ne nur de kelkaj, ĉiam la samaj, homoj . Bone, ke oni sin vizitas reciproke por pli bona interkonatigo kaj kunlaborado (ĝis Avignon kaj Tuluzo) . Paneas la retapago sed estas esperata baldaùa solvo . Pri la grupoj de Nîmes kaj Perpignan mankas informoj kaj vivosignoj . Komitatanoj necesas por informi la grupojn kaj la estraron ambaudirekte .

Renovigo de la komitato : Monique Bernard (48) ne rekandidatas . Neniu indikis pri Claudine Coulomb kaj Jean Gauthier (30) . Estas reelektitaj Fernande Terral (34) kaj Annick Tora (34); ni ĝoje akceptas Georges Gonthier (Lunel) kaj Line Maurel (Béziers) . Venontjare ni renovigos la estraron; laboremaj kaj entreprenemaj homoj estas atendataj .

Posikongrese ni eksiciis pri la forpaso en februaro de nia amiko Jean Gauthier . En nia federacia komitato li reprezentis la departementon Gard kaj fidele partoprenis niajn renkontojn . Liaj netipaj, pragmataj kaj pensigaj argumentoj foje surprizis, sed diverseco estas riĉeco ; li konstante propagandis por nia lingvo en Arles (kiel estro de la Domo por Junularo aù sur la sabata bazaro, "inter pizoj kaj karotoj", kiel li diris) kaj dank'al liaj klopodoj en Chamborigaud, estis inaĝurita tie "Vojo Esperanto" okaze de unu el niaj kongresoj . Li kruele mankos en niaj vicoj . Ni kondolencas al liaj edzino, filo kaj filino .

Nacia kongreso en Grésillon : Reprezentos nin Hélène Cazejust kaj Christian Mouré (se ili partoprenos) .

Okaze de tiu nacia kongreso, Christian Pinard (Prades 66) estis elektita kiel komitatano de Esperanto-France (UFE)
Ni varme gratulas lin; ni certas, ke li kapablos aûdigiri novan sonon en la naciaj instancoj dank'al sia prudento .

Venontjare la nacia kongreso okazos en Provenco, do relative proksime . Espereble detaloj pri la kongreso atingos nin pli frue ol ĉijare .

Prospekto komuna al la grupoj (por la forumoj) : ni adaptos tiun verkitan por la kongreso de Cap d'Agde . Kelkaj frazoj estas modifendaj, ĉar ne taûgante por ĉiuj publikoj . JH rilatos kun Line Maurel . Kolora prospekto estas kosta (pli malpli 2F), do ni presigos flankon kolore kaj la alian nigrablanke . *La artikolo aperinta en "Le Monde" (vidu sur paĝoj 8/9) estas ankai fotokopiebla en formato A3 kaj uzebla kiel argumentilo.*

Kontrakto kun UFE : Ĉar validas ĉe UFE novaj statutoj, la federacio devas agnoski tiujn novajn statutojn por esti daure konsiderata kiel federacio de UFE . Temas ĉefe pri nova organizado de la nacia asocio (kun regionaj kaj fakaj asocioj), esence la celoj restas la samaj . La plimulto de la eks-federacio jam subskribis la kontrakton . Ne subskribi la kontrakton signifus rezigni pri repago al la federacio de parto de la nacia kotizo . Generala konsento krom unu voĉo kontraŭ ; JH rilatos kun Claude Longue-Epée, prezidanto de UFE (Esperanto France) .

Forumoj de asocioj en septembro : Ili gravas por la varbado de novaj membroj; espereble la vetero estos pli favora ol lastjare en Montpellier. Ĉar la forumoj de Béziers kaj Montpellier okazas dum la sama semajnfino (Béziers, sabate/ Montpellier, dimanĉe) -ci-jare **la 13an kaj 14an de septembro** (en Agde la 20an) - Béziers antaŭvidas krei sian propran materialon por eviti transporton (ĉu vere grava problemo?). Ambaŭ grupoj rilatas kaj preparos la forumojn per aparta kunveno. Pri aliaj forumoj, la federacio pretas helpi. Sin konigi al la ĝenerala publiko nepras.

Federaciaj kunvenoj : la aŭtuna kunveno okazos en Béziers post la forumoj, la 27an de septembro je la kutima loko (Domo de Asocioj), ekde la 10a horo. Notu la daton, ĉar SFS aperos nur post la kunveno. Ĝis!

Por la printempsa kunveno (kongreso), Gignac, Marseillan, Narbonne estus ideale lokitaj (facile atingeblaj). JH rilatas kun la sekretario (Charles Gérard-Voinçon) por esplori frue la eblecojn. Dato decidota en septembro.

Ĉar en la parto "diversaĵoj" estis la punkto "**Baloto 2004**" (Eŭropa baloto), ni rezignis pri la distra parto, por pridiskuti aferon, kiu jam dividis esperantistojn en Cap d'Agde kaj ĉe UFE. Temas pri propono de Christian Garino (Chambéry), kiu jam lanĉis peticion por E° je bakalaŭro (kiun nia federacio subtenis), starigi liston poresperantan, konsiderante ke nenio estas atendenda de la politikaj partioj por la promocio de E°. Francio estos dividata en 7 grandaj regionoj; la sudokcidenta regiono (Akvitanio + Sud-Pireneo + Langvedoko-Rusiljono) reprezentos 18 departementojn kaj elektos 10 deputitojn. *En mia regiono kunordigis Thierry Saladin*. Ne estas certe, ĉu estos kandidatoj en ĉiuj regionoj.

Esprimiĝis diversaj vidpunktoj poraj kaj kontraŭaj.

Por : Tiel oni konigos la ekziston, celon kaj utilon de E° / Oni havos la eblecon uzi la amasinformilojn / "Kiu riskas nenion, tiu akiras nenion" / Malpli gravas esti ridinda ol nekonata / Ni ne riskas multe (krom monon) / Eblas lastmomente ne prezenti liston / La afero vekos intereson por la estonto kaj estontaj balotoj / Ni ne estu konstante timemaj !.

Kontraŭ (plimulto de la ĉeestantoj) : Antaŭvideblas, post magra rezulato, la argumento, ke E° interresas neniu, kio fermigos al ni multajn pordojn / Konsiderindaj sumoj estos necesaj, ne nur por deponi liston; ĉu ne pli bone investi alimaniere, ekzemple por karavano en somero? / La projekto ne havas grandan sencon sen listoj en aliaj landoj / Ni ridindigis E-on per nekompleta politika projekto / Ni perdos pene gajnitajn simption kaj apogon ĉe aliaj partioj, eĉ geamikoj / La afero kreos malakordon inter Esperantistoj.

Konklude la federacia prezidanto estis komisiita peti de UFE novajn klopodojn ĉe la diversaj partioj / kandidatoj por konsiderigi E-on kiel solvon en la konstruata Eŭropa Unio (*la teksto de tiuj intervenoj estas jam pretaj*) kaj de la iniciatintoj kontaktojn eksterlande por plurlanda projekto. Afero sekvota!

Ni rendevuis ĝis septembro, post ripozigaj ferioj, por nova etapo de nia poresperanta laboro.

Post la sabata kunveno estis planitaj dimanĉe pikniko ĉe lago Salagou kaj eksposicio en "Halle Dardé". La pikniko okazis, kun reduktita nombro da partoprenantoj, en laeksposiciejo, pro malbona vetero. Se vi havos la okazon viziti Celles (la forlasitan vilaĝon rande de lago Salagou), vi trovos tekston en esperanto (kaj en aliaj lingvoj).

Pri la eksposicio : vizitis kelkaj interesaj interesataj personoj (ankaŭ eksterlandanoj, kiuj venis por viziti la vidindan "Halle Dardé"), sed la dato ne estis plej oportuna (lokaj festo kaj foiro).

Jurnalisto de "Midi Libre", kiu ankaŭ anoncis dufoje nian renkonton, vizitis nin dufoje, atente aŭskultis kaj fotis. Estas nekonata, ĉu aperis raporto. Ĉar samdate okazis la tradicia procesio de St Fulcran, pluraj centoj da homoj preterpasis la eksposiciejon kaj povis konstati, ke temas pri esperanto. Respondeculo de la urbdomo proposis *reveni* alian fojon por pluraj tagoj kaj inviti la lokajn lernejojn al nia eksposicio. Interesa ideo; volontuloj por dejori serĉataj!

Ni esperas, ke venontjare, ni povos denove organizi eksposicion kaj anonci ĝin sufice frue kaj amplekse. Ankaŭ, ke komuna pikniko eblos, pro tio bona elektado de la dato gravos. Pripensu kaj proponu!

INFORMADO :

Necesas reciproka informado inter esperantistoj, grupoj, ene de la federacio, ene de la nacia asocio, ktp.
Tio nun eblas inter membroj de UFE sur la reto. Multaj el vi konas "Okazas", kie estas troveblaj koncizaj, aktualaj informoj. Informu sufiĉe antice la komplilanton de "Okazas", J-L. Texier, se vi deziras, ke via informo aperu naciskale kaj ĝustatempe. Se temas pri mencio de okazintajo, ne atiendu tro longe; via sperto povas utili al aliaj. Ekzistas tutpreta formularo, se vi ne ŝatas redakti leteron; petu ĝin de SFS kaj ne forgesu sendi kopion al via regiona bulteno. Bone informu tutan Francion sed ankaŭ informu viajn najbarojn!
Por respondi al demandoj (generala informado) aŭ montri, ke E° ekzistas en ĉiuj departementoj (propagando), Esperanto France petas la respondeculojn de grupoj, kursoj, aranĝoj, stagoj -eĉ se ili ne estas membroj de FE-plenigi enketilon pri la kursoj/stagoj okazintaj en la lasta (lerneja) jaro kaj planitaj por la venonta. Eventuale petu de SFS, se vi ne ricevis ĝin. Eble iu serĉas kurson en via urbo... Kaj ne forgesu sendi kopion al ni! Nur per kunlaborado ni estos pli efikaj.

VIVO DE LA GRUPOJ

BÉZIERS

Antaù ol deziri al vi bonajn feriojn, mi volas informi vin, ke **nia venonta kunveno okazos la 6an de septembro** en nia oficejo de la 3a etago por prepari **la tagon de Asocioj sur Aleoj P. Riquet la 13an de septembro** (ambau sabate). Poste niaj monataj kunvenoj okazos : **la 20an de septembro** (organizo de kursoj kaj staĝo), - **la 8an de novembro**. Pro multaj esperantaj okupoj **ne estos oktobra kunveno** (la 20a de septembro anstatau gîn).

La Zamenhof-tagon ni festos la 6an de decembro. Informoj en la venonta SFS.

Suzanne Authier

Staĝo : ĝi bone disvolviĝis en majo kun 34 homoj. Kelkajn rimarkojn ni konsideras por plibonigi tiun agadon. Ni cerbumas por trovi alian agrablan lokon, se eblas ; precipite rilate la klasĉambrojn. Se vi havus ideon pri eventuala loko (ne tro multekosta), sufiĉe proksima de Béziers, vi estus afabla ĝin indiki al ni. **La staĝo okazos en 2004 de la 19a ĝis la 26a de majo.** Agrablan someron al ĉiuj.

Esperanto-staĝo organizita de CBE :

Le Cercle biterrois d'espéranto organizis sian jaran staĝon de la 14a ĝis la 21a de Majo.

Tridek gelernantoj de multaj regionoj kaj kvar instruistoj estis, kiel lastjare, en "La Dragonnière", inter Béziers kaj Vias.

Simone Bernard, el Le Bouscat apud Bordeaux, gvidis la kurson de la gekomencantoj, Thierry Saladin el Montpellier la duan nivelon, Josée Lafosse el Toulouse la konversacian grupon kaj Sro Salvador Aragay el Barcelono la superan kurson.

Ĉiuj gelernantoj asidue sekvis la kurson kaj ĉiuj progresis. Kvar gelernantoj kandidatiĝis por la "Kapableco, unu por la dua grado, neniu por la unua.

La diversaj vesperoj estis agrablaj : filmoj, prelego de Sro Aragay pri Barcelono. Li montris al ni belan turismogazon, skribitan en multaj lingvoj inter kiuj esperanto. Bona ekzemplo por ni.

La gelernantoj de Josée Lafosse legis dialogojn, skeĉojn, kantis kaj ludis kun la publiko.

La "trupoj" de Béziers kaj de Montpellier prezentis diversajn skeĉojn aŭ monologojn je la lasta tago.

Jean-Pierre, la "cefregisoro", direktis la teatraĵon. Fernande diris siajn poemojn, Loulou kaj Claude dancis. La publiko, tre amuzita, forte aplaŭdis ĉiujn geaktorojn kaj mašinistojn.

Dum la fina kunveno, post la aperitivo, la partoprenantoj donis siajn opiniojn, faris kritikojn kaj komplimentojn : abunda mangajo sed malmulte varia, malrapideco de la servo, klasĉambroj tro malgrandaj... sed ili ankaù diris sian kontentecon pri la agrabla etoso, la kompetenteco de la geinstruistoj, la afableco de la servistaro.

Kelkaj kuraĝuloj hanis sin en la banejo; malgraù la suno, la vetero malvarmis kaj pluvis unu- aù du-foje.

La biteranaj organizantoj serĉos alian lokon pli taûgan, kie oni ne malplenigos la monujon.

Jen la poemo de Fernande, verkita por la staĝo de 2003. Ĝi estos ĉiam vera en 2004.

La CBE

Saluton, karaj geamikoj !

Tutkore ni akceptas vin .

Alloga estas la Dragonnière,

Ĝia ĉarmo plaĉos al vi .

Uzu ĝin la tutan semajnon .

Bone laboru, kompreneble,

Elektu la kurson konvenan .

La krokodilon lasu for .

Estu gajaj kaj bonhumoraj !

Fernande



MONTPELLIER

VIZITO DE G. KERSAUDY

La 19an de aprilo nia grupo akceptis Sron Kersaudy, eminentan lingviston, kiu parolas kvindekun da lingvon kaj verkis la referenclibron "Langues sans frontières". Lian viziton antauis multe da laboro por prepari kaj pendigi afișetojn, trovi taŭgan salonon (disponigita senpage de la urbdomo), sendi invitilojn, viziti librovendistojn, ktp. Dank'al ĉies kontribuo la prelego estis sukcesa. Partoprenis pli ol 40 personoj, membroj de nia grupo sed ankaŭ neesperantistoj. Senkulpiĝis pluraj oficialuloj (Sroj Blanc, Frèche, Vézinhet...). Foje kun la helpo de lumbildoj, foje sen, la preleganto promenigis nin tra la mondo de lingvoj kaj montris al ni sian klerecon. La nura bedaŭro estas, ke la temo de la prelego (komunikado en Eŭropo) estis de tempo al tempo forgesita, ĉar nia samideano kapablas detale paroli pri diversaj aspektoj de lingvoj. Li afable respondis la diversajn demandojn. Almenaŭ du personoj diris sian pretecon eklerni esperanton; afero sekvota. La librejo Sauramps mendis dudekon da libroj de GK sed ne alportis ilin al la prelegejo, do supozble ili vendos ilin kaj tiel reklamos pri la internacia lingvo, kiun favoras GK. Post la prelego ni kune vespermanĝis en apuda restoracio. La sekvantan tagon geesperantistoj veturigis GK al la kongreso de Cap d'Agde, kie denove li prelegis pri la sama temo.

MONATAJ KUNVENOJ

La nova formulo (sabaton matene) kontentigas niajn samideanojn, kiuj po 15 ĝis 20 regule partoprenas. Ĉiam sekvas komuna tagmanĝo, kie regas bona etoso. Por la lasta kunveno de junio venis 15 homoj, pluraj senkulpiĝis. Partoprenis triopo el Béziers, ni ĝojas pri la vizito kaj certe reciprokos en aŭtuno. Pluraj grupanoj teatrumis por nia plezuro. Unu el ni (GG) alportis belajn kaj bongustajn ĉerizojn, kiujn li estis plukinta je la kvina horo matene! Gratulojn!



Malfeliĉe ni eksciis pri la forpaso de nia amikino Micheline May, subite estiginginta fine de majo. Si estis fidela amino de nia grupo, ĉiam partoprenis kaj ĝojis retrovi siajn esperantistajn geamikojn, ĉar esperanto estis plensignifa idealo por ŝi. Si lasas vakuon inter ni.

Memore al ŝi, ni observis kun emocio minuton da silento kaj kondolencas al ŝiaj familiianoj.

La Forumo de Asocioj disvolviĝos la 14an de septembro, ni esperas, ke ĉiujare la vetero estos pli favora kaj ebligos al ni deĵori la tutan tagon kaj varbi novajn membrojn. Por prepari tiun gravan tagon, **ni kunvenos la antauan sabaton, la 6an de septembro**. Ni bezonas homfortojn por pretigi dokumentojn, dividi la taskojn, instali ekspozicion, akcepti la vizitantojn, ktp. Notu la du datojn, venu kaj helpu! Anticipan dankon kaj agrablajn somerferiojn

PRADES (P-O)

Bien vu, vite dit : avec les espérantistes

Les liens se tissent entre espérantistes. En neuf mois d'existence le club espéranto Conflent a vu le nombre de ses adhésions augmenter.

"Preuve s'il en est, confie le président Christian Pinard, que cette langue internationale a ses adeptes en Conflent.

Nous ne sommes pas encore des dizaines : chaque mercredi, à 20 h 30, au local Mosaique, pour des cours gratuits, mais les quelques aficionados travaillent assidûment.

Les anciens ont déjà un niveau ho-

norable et n'ont d'ailleurs pas peur d'aller à la rencontre d'autres espérantistes.

Dernièrement deux d'entre nous ont participé au congrès de l'Association française espérantiste SAT-Amikaro.

Nous avons découvert l'ambiance du monde espérantiste, suivi les débats avec intérêt et participé aux cours d'initiation et de perfectionnement.

Des liens prometteurs et intéressants ont été tissés avec les "samideanoj" ("ceux qui partagent la

même idée") de Catalogne-Sud. L'Université catalane d'été a proposé un atelier d'espéranto en 1998".

Le club poursuit ses projets avec la réalisation d'une plaquette d'information touristique de la région, en espéranto qui sera disponible à l'Office de tourisme.

Enfin les personnes intéressées par l'espéranto sont invitées à rejoindre le club.

Pour tout renseignement, téléphoner au 04 68 05 24 41.

LUNDI 26 MAI 2003

LA CANOURGUE

Kiel anonicte en la lasta SFS, turisma semajno okazos en Lozère en septembro. Temas pri evento, kiun ni ne ripetas kaj kiun ni ŝuldas al la vizito de flandraj geamikoj (14). Eblas partopreni unu, du tagojn aŭ la tuton. Nura kondiĉo : laŭpove ne krokodili (paroli en la franca), pro respekteto al niaj gastoj. Alveno en Clermont-Ferrand sabaton la 6an vespere; dimanĉon la 7an, vizito de Vulcania, sub la gvido de lokaj esperantistoj kaj veturado ĝis La Canourgue. Lunden la 8an : vizito de Ste Enimie, mezepoka vilaĝo, de la groto Aven Armand sur la altebenajo, de la observejo de la vulturoj en la valo de Jonte, de Montpellicr le Vicux kaj de la Tarn-gorĝo. Mardon la 9an : St Flour, Chaudes-Aigues, Laguiole, montaro Aubrac ; gustumado de "aligot", vespere lumbildaro pri Aubrac tra la sezonoj. Merkredon la 10an : Sévérac, Millau (nova viadukto kaj prilaborado de felo), keljo de la fromago Roquefort, altebenajo Larzac. Ĵaudon la 11an : la Lot-valo kaj la vojo de la pilgrimantoj al Compostella, Conques, Rodez. Vendredon la 12an : vizitoj en la ĉirkauaĵo. Sabaton la 13an : veturado al Le Puy en Velay, vizito gvidata de loka esperantisto. Mezepokaj festoj. Dimanĉon la 14an : veturado hejmen aŭ daŭrigo de la festoj. Interesatoj bonvolu rilati kun J. Hénin (adreso sur la lasta paĝo).

Un même langage pour tous



Au centre, M. Kersaudy, célèbre polyglotte, passionné d'espéranto.

■ Georges Kersaudy, expert linguiste et polyglotte passionné, était de passage à La Canourgue, mardi 22 avril, en compagnie des présidents des fédérations régionales d'*espéranto* : le Canourguais Jean Hénin et l'Auvergnat Eugène Papciak.

M. Kersaudy revenait de deux conférences « *espérantistes* » organisées à Montpellier et au Cap d'Agde.

A 82 ans, Georges Kersaudy, ancien fonctionnaire international, parle, écrit et traduit une cinquantaine de langues d'Europe et d'Asie. Il est l'auteur du fameux livre *Langues sans frontières*, paru dans la collection *Autrement frontières*, qui entraîne le lecteur à la découverte des langues européennes. Défiant les idées reçues, cette encyclopédie comparative est aux antipodes d'un traité linguistique : l'idée principale étant qu'il n'y a rien de plus proche d'une langue qu'une autre langue, à condition de ne pas en avoir

peur et de se laisser guider par la curiosité.

A 16 ans, Georges Kersaudy ne connaissait « que » sept ou huit langues. C'est alors qu'il découvre l'*espéranto*, qui va changer sa vie en lui facilitant l'apprentissage de toutes les autres langues et les échanges linguistiques et amicaux.

L'espéranto fut fondée en 1887 par un Polonais, le Dr Zamenhof. Facile à apprendre, elle est pratiquée à ce jour par environ trois millions de personnes dans les 119 principaux pays du monde.

« L'anglais est la langue du business, et l'*espéranto* est celle de l'amitié ! », explique le linguiste.

L'idéal serait que chacun parle à la fois sa langue maternelle et l'*espéranto*, pour que toute la planète puisse communiquer plus facilement.

Mais ce n'est encore qu'un rêve... auquel pensera sûrement M. Kersaudy avant de s'envoler pour Rotterdam aujourd'hui. •

Midi Libre ↑ Lozère (25/04/03) et ↓ Béziers (21/4)

CONGRES

Les "espérantistes" sont réunis au Cap d'Agde

Cette langue n'a pas de frontière

■ Par sa vocation touristique, le Cap d'Agde est une station où se croisent nationalités et langues. Il est pourtant, depuis le début de ce week-end, un lieu où l'on discute dans un langage inhabituel. C'est le village vacances Azureva où se tient le 58e congrès de "Sat-Amikaro", une association internationale dont la section française est, dans l'hexagone, l'une des principaux acteurs de la défense et de la promotion de la langue "esperanto". Cette langue internationale fondée en 1887 par un Polonais, le Dr Zamenhof, serait à ce jour pratiquée par 4 millions de personnes dans le monde. En France, on estime à 30 000 le nombre de ceux qui, pour abolir les frontières de la langue, font couramment usage de cette grammaire et ce vocabulaire dont l'apprentissage, assurent les espérantistes, est « un jeu d'enfant ». Créeé essentiellement à partir du latin, l'*espéranto* fait cependant également appel aux racines germaniques, anglo-saxonnes, mais aussi grecques et arabes.

Au cours de leur congrès qui s'achèvera ce soir, les adhérents vont bien évidemment mettre en pratique ce "sésame" international. Les 200 congressistes présents sont en effet venus non seulement de toute la France mais aussi d'Allemagne, Italie, Suisse et Belgique. Et ici, plus besoin de traducteur !

De là à rêver d'une planète ne parlant plus qu'un seul et même langage, le pas n'est pas franchi. « Il n'est pas question de substituer l'*espéranto* aux langues nationales. L'idéal serait que chacun parle sa langue, et l'*espéranto* en plus ». Une langue internationale dont l'un des avantages, assurent ces spécialistes, est qu'elle « s'écrit comme elle se parle ». Et il faut dix fois moins de temps pour le maîtriser que pour apprendre l'anglais. Premier exercice pratique : en *espéranto*, *Midi Libre* se dit *Libera Sudo*. •



Deux cents congressistes réunis au Cap d'Agde jusqu'à ce soir.

La kongreso de la surprizoj

La organizantoj de la 58a kongreso de SAT-Amikaro, jus okazinta en Le Cap d'Agde, en suda Francio, pensis ke ĝi estus jam sukcesa se pertoprenus en ĝi 150 aŭ 160 esperantistoj. Nu, entute aligis 202 el kiuj plimulto el Francio, sed ankaŭ el Belgio, Katalunio, Hispanio, Italo, Germanio... Ĉio okazis en bonaj kondiĉoj en tiea feria vilaĝo "Azureva" (unu el la 40 de Francio), dank'al la diskreta sed efika preparado kaj laboro de la Organiza Kongres-Komitato, kiun gvidis Josée kaj Michel Lafosse.

La urbestraro de Agde konsentis ne nur pri afiŝado de publika franclingva prelego de la aŭtoro de "Langues sans frontières", Georges Kersaudy, pri "La komunikado en plivastigita eŭropa komunumo", sed ankaŭ pri senpaga disponigo de la plej bela el la salonegoj de ĝia Kongrespalaco. La neesperantista publiko estis bedaŭrinde malplimulta. Estas menciinde ke partoprenis ankaŭ la direktoro de Azureva. Kritikoj kontraŭ Esperanto tamen audiĝis flanke de ĉeestantoj, kiuj sciis nenion antaŭe pri la lingvo.

Dum la pasinta agadperiodo, SAT-Amikaro perdis naŭ fidelajn membrojn el kiuj ses pro morto, sed esence pro la mal-kresko de la nombro de novaj lernantoj de la perkorespondaj kursoj. Ne ankoraŭ efektiĝis la projekto de nova revuo jam priparolata pasintjare, ne pro la manko de valoraj kunlaborantoj, sed pro la manko de libera kaj kapabla ĉefredaktanto. Tre surprizitaj estis la kongresanoj kiuj unuafoge vizitis la Libroservon de SAT-Amikaro : kuŝis centoj da libroj kaj artikloj sur 30 metroj da tabloj. Multe vendiĝis la plej nova libro de Raymond Gueguen eldonita de SAT-Amikaro sub la titolo "La langue internationale ou la recherche d'une langue commune" (La internacia lingvo aŭ la serĉado de komuna lingvo).

Ne facile resumeblas la programo de prelegoj kaj kunvenoj kiu okupas 3 paĝojn de la kongreslibreto. Granda parto el la kunvenoj koncernis la partoprenon de la SAT-movado (SAT kaj asocioj subtenantaj ĝin, i.a. SAT-Amikaro) en diversaj sociaj kaj politikaj manifestacioj : 1a de Majo, Eŭropa Sociala Forumo okazonta en Novembro, Eŭropaj balotoj de 2004.

Efektive, plifortiĝas kaj plivastiĝas la ideo prezenti liston de kandidatoj okaze de tiuj balotoj, sub la nomo "Neŭtrala Federa Lingvo Esperanto". Almenaŭ ĝis nun, ĝi ricevis la subtenon de la fama sciencisto Albert Jacquard kaj de Georges Kersaudy. Pliaj detaloj estas riceveblaj de Christian Garino : esperviv@hotmail.com aŭ legeblaj ĉe : europesperanto.multimania.com.

KONGRESO DE CAP D'AGDE (aldone al la raporto de "Midi Libre" p.6)

Koncerne la amasinformilan aŭ eksteran efikon de tiu kongreso, krom la afișoj, aperis bona artikolo en la gazeto "Midi-Libre". Fine de la kongreso, la direktoro de la vilaĝo Azureva de Cap d'Agde proponis ke oni planu por lia centro unusemajnan programon de Esperanto-instruado kiu cetere povos esti anoncita en la venonta 150-paĝa belega katalogo de Azureva.

Inter la belaj kaj ŝatataj eroj de tiu kongreso estis la dimanĉ-vespera plurlingva kantado de JoMo kiu vigle, petoleme kaj gaje prezantis en Esperanto kanzonojn en la rusa, ukraina, itala, hispana, jida, araba, japana, cigana, pola... Estas notinde ke la eldono de la jaro 2000 de la libro "Guinness" de la rekordoj registris lin pro kantado en 22 lingvoj.

Ankaŭ tiu spektaklo havis pozitivan eksteran efikon, char la personoj kiu konstatis la valoron de Esperanto post la prelego de Georges Kersaudy rekonis, ke temas pri nekontestebla vivanta lingvo kaj ke li eraris. Vere bela surprizo por ĉiuj, eĉ por la "malamikoj" de la Internacia Lingvo !

Tiel bela ke pluraj kongresanoj esprimis la deziron revidi JoMon en la venontara kongresurbo de SAT-Amikaro : La Roche-sur-Yon, kiu tiam celebros sian ducent-jariĝon.

FLASH ESPERANTO ILE-DE-FRANCE - n° 169 de juin 2003

Raymond Gueguen

La langue internationale

*ou
la recherche
d'une langue
commune*

SAT-Amikaro
Paris

Danke tiun Franclingvan libreton, la Esperantistoj kaj Esperantanoj, kiuj bonvolas faradi al si la penon, por pledi por la ĝenerala akcepto de Esperanto kiel internacia lingvo, povos senkomplexe argumenti aŭ simple disponigi ekzemplerojn al interesiĝantoj pri la demando.

Surprize fortaj la SAT-bastiono

Granda sukceso por la paska 58^a kongreso de SAT-Amikaro, en Le Cap d'Agde (Francio), kiu altiris pli ol 200 personojn, anstataŭ la antaŭviditajn 150: ne nur el Francio, sed ankaŭ el Belgio, Katalunio, Hispanio, Italo, Germanio...

Por la franclingva ĉefprelego de Georges Kersaudy pri *La komunikado en plivastigita eŭropa komunumo* la neesperantista publiko estis tamen minoritata.

Ne facile resumeble estas la programo de prelegoj kaj kunvenoj. Multaj koncernis la partoprenon de la laborista E-movado (ĉefe la tutmonda SAT kaj la franclingvia SAT-Amikaro) en diversaj sociaj kaj politikaj manifestacioj: Unua de Majo, Eŭropa Socia Forumo okazonta en novembro 2003, EU-balotoj en printempo 2004.

Plifortiĝas kaj plivastiĝas la ideo prezenti liston de kandidatoj okaze de tiuj balotoj, sub la nomo *Neŭtrala Federa Lingvo Esperanto*. Ĝi ricevis interalie la subtenon de la fama sciencisto Albert Jacquard kaj de la renoma lingvisto Georges Kersaudy.

Inter la belaj kaj ŝatataj kongreseroj estis la plurlingva kantado de JoMo. Vigle, petoleme kaj gaje li prezantis E-kanzonojn el la rusa, ukraina, itala, hispana, jida, araba, japana, cigana, pola... Estas notinde ke la eldono 2000 de la *Guinness*-rekordlibro registris nian JoMon pro kantado en 22 lingvoj.

SAT-Amikaro fermis pozitivan administran jaron, precipe pro la inaŭguro de propra sidejo en Parizo. Sed la kresko de la lasta jardeko iom paŭzas, esence pro malpli da komencantoj ĉe la perkorespondaj kursoj. Malfruas la projekto de nova revuo, ĉar mankas libera kaj kapabla ĉefredaktisto. Komprene vejas admiron la libroservo, kun la plej riĉa sortimento en la tut-a teritorio.

La kongreso, organizita precipe de Josée kaj Michel Lafosse, estis sukcesa ankaŭ ĉe la loka informado.

Kongresurbo 2004: La Roche-sur-Yon, tiama 200-jara. (HM)



El "Heroldo" n° 6

L'égalité des langues : une nécessité pour l'Europe

L'inégalité linguistique, avec le privilège dont jouit aujourd'hui une seule de nos langues nationales, met en danger la diversité culturelle qui est une des richesses de l'Europe, et elle aggrave le déséquilibre économique et social de cette Europe. Pour respecter la règle d'une égalité des droits de toutes les langues de l'Union Européenne (UE), celle-ci dépense chaque année 2 milliards d'euros (34 % de ses dépenses de fonctionnement) pour l'interprétation et la traduction. Sans qu'il y ait eu de débat public sur le problème, c'est l'anglais qui est le plus fréquemment utilisé au sein des instances européennes. Ceci entraîne des priviléges et des discriminations injustes et inacceptables. Est-ce que l'UE souhaite forcer tous les Européens à parler anglais ?

Les effets économiques et sociaux de l'inégalité des langues

